# *Lula kritikas usonan blokadon kontra? Kubo en hinda gazetaro*

*Image not found or type unknown*

**Foto: PL**

Nov-Delhio, sep 11 (RHK) La prezidento de Brazilo, Luis Inácio Lula da Silva, kritikis la usonan blokadon kontra? Kubo kaj asertis, ke la kariba nacio ne estas lando de teroristoj, Firstpost publikigis ?i-lunde en Barato.

En ampleksa intervjuo donita al tiu nova?- kaj amaskomunikila retejo dum sia partopreno en la lastatempa Pintkunveno de la Dudek-grupo (G20), la brazila prezidento denuncis, ke Kubo estas sub ekonomia, komerca kaj financa sie?o dum 60 jaroj de Va?ingtono kaj tial la lo?antaro de la insulo ne povas disvolvi?i la? ?i volas.

Li anka? pledis por la elimino de la kampanjo kontra? Kubo, por kredigi ke  ke ?i estas lando kiu gastigas teroristojn, per kio ili provas pravigi la blokadon.

Lula certigis, ke en siaj pli ol 30 jaroj de vizitado de la insulo li neniam vidis teroristajn trejncentrojn a? amasdetruajn armilojn.

Tial, li diris, en mia unua ?anco kun la usona prezidento Joe Biden, mi diros al li, ke necesas ?esi sankcii la kariban nacion.

Ne estas klarigoj, mi malkonsentis kun la blokado kiam mi estis 50-jara, nun mi estas 77-jara kaj mi ankora? ne komprenas kial da?ras ?i tiu politiko kontra? Kubo, li aldonis.

La brazila ?tatestro severe kritikis la sankciojn kaj blokadon nuntempe aplikatajn kontra? Kubo, Venezuelo kaj Irano.

Li kredis ke tiuj politikoj estas pli malbonaj armiloj ol bomboj, ?ar iliaj viktimoj estas virinoj, infanoj, kaj homoj ?enerale.
Tiusence li emfazis, ke necesas reguloj, por ?an?i tiun konduton kaj trovi alian manieron fari politikon en la mondo.

Lula precizigis, ke la planedo devas lerni vivi en paco kaj harmonio, anstata? detrui unu la alian.

Li aludis anka? al temoj kiel la Hinda Prezidanteco de la Pintkunveno de G20 kaj la rolo, kiun Brazilo ludos ?e la estro de la bloko, geopolitikaj konfliktoj sur la planedo kaj la rolo de tutmondaj institucioj.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/333649-lula-kritikas-usonan-blokadon-kontrau-kubo-en-hinda-gazetaro

Radio Habana Cuba